# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro : 1 2022

## ONI ELŜALTIS LA MAŜINON KIU SUBTENIS ARTEFARITE LA VIVON DE JUNULO EN BRITIO

Brita knabo, Archie Battersbee, kiu cerbe mortis la pasintan monaton aprilon, definitive forpasis komence de aŭgusto. La cerba morto okazis post la konstato, ke en ties cerbo ĉesis tute kaj konstante la elektra aktivado kaj la refleksoj. La memvola spirado ankaŭ ĉesis, do ĝi nur okazis dank'al maŝino.



Cerba morto de la junulo okazis post akcidento, kiam li ligis ŝnuron ĉirkaŭ sia kolo, tutcerte kiam li partoprenis en soci-reteja defio. Ekde la unua momento la sanitaraj respondeculoj de la hospitalo, kie troviĝis la knabo, proponis elŝalti la maŝinon ebligantan la spiradon. Ili opiniis, ke ekzistis neniu ebleco rekuperi la sanon aŭ la konscion de la knabon.

Tiam la familio ekigis juran proceson por daŭrigi lian vivon, eĉ artefarite. Tamen, juĝo de brita kortumo kaj poste interveno de la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj, pravigis la hospitalon. Lastmomente la familianoj proponis transloki la knabon en alian landon ekster la brita kaj eĉ eŭropa jurisdikcio, sed la kuracistoj ne akceptis tion, pro la fakto, ke kiu ajn movo de la junulo povus plie endanĝerigi lian situacion.

Dum la jura proceso en Britio, juĝistoj certigis, ke estis necese atingi la plej taŭgan situacion de la knabo. Tiel, se la rekupero estis tute ne ebla, la sola logika decido estus malfunkciigi la maŝinon kiu daŭrigis arteferite lian vivon, tiel li povus forpasi pace.

Laŭ la brita jurisprudencio, okaze de malakordo inter gepatroj kaj kuracistoj rilate kuracadon de infano, la interesoj de la malsanulo estas la pleje prizorgota afero, eĉ pli ol la deziroj de la gepatroj. La Supera Kortumo de Londono elstaris la amon kaj sindediĉon de la familianoj, tamen estis necese ebligi la pacan ripozon de la junulo.

# *Vorto de la Semajno*

**Aŭtentikigi:** Oficiale certigi la nedudeblan verecon de dokumento.

**Aŭtentikeco:** Eco de io aŭtentika.

**Aŭtentika:** Nedudeble vera, originala, ne falsita.

Sinonimo: legitimi.

*La notario aŭtentikigis la kontrakton, do ĝi povos esti montrita okaze de jura proceso.*



Jen ni denove. Ni dankas ĉiujn niajn fidelajn legantojn, membroj kaj simpatiantoj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, kiu interesiĝis kaj demandis pri la reeldono de ĉi tiu malgranda jura bulteno. Ni feriis dum la someraj monatoj kaj nun, en oktobro, ni denove komencas aperigi ĉiusemajne “Juran Semajnon”.

Kadre de la pasinta Universala Kongreso de Esperanto (Montrealo 2022), fondiĝis la Unio Internacia de Advokatoj Esperanntingvaj. Temas pri asocio specife elpensita por renkontigi juristojn kiuj profesie laboras kiel advokatoj. UIAE tute ne konkurencas kun Internacia Jurista Esperanto-Asocio, male ambaŭ asocioj kunlaboros en la disvastigo de la internacia lingvo en juraj medioj.

Pliaj informoj ĉe: www.uiaeesperanto.com

***Pacon en Ukrainio kaj ĉeson de agresoj, perfortoj kaj kiu ajn agado kontraŭ la internacia homarana juro***